Registered at G.P.O., Melbourne, for transmission by Post as a newspaper.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :
Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 88 (Eighth Year) Melburno *(Melbourne)*, Australio 10 Octobro 1927

ANSWERS TO QUESTIONS RE LANGUAGE.

—

Translated from the Esperanto of

—

It has been decided to print from month to month the most useful and interesting of the "Lingvaj Respondoj" in English dress. This possibly will be of help to many Esperantists who in their first period of study rightly feel the need of the guiding counsel of "la majstro." The original, which every serious Esperantist should possess, is obtainable from the Melbourne Esperanto Society, Box 731F, Elizabeth Street P. O.

Concerning the Use of the Article.

You are giving yourself needless trouble over use of the article. You must remember that in our language the use of the article is not compulsory: consequently the best way out of the difficulty is as follows. Use it when you are certain that its use is necessary and logically required, but in all doubtful cases leave it out altogether. It is better to leave out the article when it ought to be in, than to use it when logic and the customs of all peoples are against such use. For example if you were to say, "venis tago, kiun mi tiel longe atendis," your sentence would not be in quite good style, but it would not be absolutely erroneous, although you should have said, "la tago"; but were you to say, "hodiaŭ estas la dimanĉo" instead of "hodiaŭ estas dimanĉo," you would then have made a straight out error, disagreeable to the ears of every good Esperantist.

Concerning "Sidiĝi" and "Eksidi."

Instead of "sidiĝu" it would be better to say: "sidigu vin" or "eksidu." Nevertheless, because the form "sidiĝu" has for a long time been used by almost all Esperantists it has become by now an "Esperantism," and it would be wrong to call it an error. Not only in natural tongues but also in an artificial language anything that is used by the greater part of good writers must be regarded as sound, even if not absolutely logical; for if we were to insist on being guided only by absolute logic then the untrammelled use of an artificial language would be quite impossible, because the whole benefit of long practice would be lost, and in the tenth year of one's use of the tongue, as in the first, one would constantly be compelled lengthily to weigh and consider every word. Nevertheless the difference between the natural language and the artificial one lies in the fact that while in the first named we are restricted to the use of those forms used by good writers, and the employment of more logical expressions is forbidden, —in an artificial language everyone has the right to use a form more logical, although no one has previously used it, and he can rest assured that if his form is indeed worthy of

acceptance it will soon find many imitators and little by little take the place of the less logical from hitherto used.

Concerning the Apostrophizing of the Article.

The expression "reunuigi l'homaron" is indeed bad because the apostrophizing of the article is permissible only after a preposition ending in a vowel. But the non-observance of this rule, which is given not in the grammar but only in the "Ekzercaro" (ex. 29) is not an error but only an offence against good style. Therefore, in prose this rule must be observed, but in verse poetical licence often permits of deviation from the ordinary style, and failure to observe the above rule, or rather advice, is not an error. In verse we must brand as errors only deviations from grammar (for example, the apostrophizing of the adjective, use of various ungrammatical forms, etc., such as very often are met with in the work of budding Esperanto verse-makers).

Concerning the Esperanto Style.

In my translation of "La Revizoro" one will sometimes find sentences that are not at first sight understood: for the most part such sentences occur in the sayings of Osip. Nevertheless, you are mistaken in your supposition that such are a literal translation of the Russian style. Osip speaks, not in a manner quite logical and literary, but after the fashion of an ignorant Russian servant, and I had to conserve that style at least in some measure in order to avoid entirely destroying the characteristics of his utterances. Often he actually cripples words. I strove to avoid doing the same, because although it is possible to give explanatory footnotes for the reader, that cannot be done for the auditor in the theatre. In one place was I forced to use "registreto" instead of "kolegia registratoro" (a humble official post in Russia), and instead of giving tiresome explanatory notes I just put the word between inverted commas in order to show that it was not normal. In other places I used expressions that were not correct, but that were nevertheless not crippled (for example, I intentionally wrote "kartetoj" instead of "kartoj" (playing cards), "publikaĵo" instead of "publikeco" and so on). I hope that the reader or hearer will readily understand that this is not good Esperanto style, but the style of an uncultured person, or the peculiar mannerism of this or that character in the play.

Some Esperantists think that I use a Slav style in my works. Such an opinion is wholly wrong. True it is that the Slavs often possess a better Esperanto style than German and Romance peoples; but this is not because the style of Esperanto is Slav, but simply because the Slav word-order is simpler than that of the other tongues and consequently is nearer to the word-order of Esperanto. The true Esperanto is neither Slav nor German nor Romance, but is—or at least should be—a style simple and logical.

But all in reasonable measure. Also in Esperanto occur various (not many) idioms, and some Esperantists are opposed to their use, but quite mistakenly, for a language absolutely logical and free from idiom would be a language lifeless and heavy; but although some of the Esperanto idioms are indeed taken from the Slav tongues (while others are taken from other languages) they nevertheless are not Slavisms but Esperantisms, because they have become part of the language.

The Esperanto style is not a blind imitation of the styles of other languages: it possesses its own peculiar and independent character, which took shape during the long practical use of, and sustained thought in, the language before it was published. If a Slav not possessing sufficient knowledge of the language translates literally from his national tongue into Esperanto, his style is just as bad and nonsensical as that of the German or Latin beginner. For example here is a piece from one of those letters that I often receive from Russians, who, although they have mastered the grammar and vocabulary of Esperanto, have not yet apprehended its spirit, and so translate literally from their mother tongue. Compare the style of this piece (grammatically and verbally faultless) with the true Esperanto style and you will see immediately how mistaken is the opinion of those who speak of the "Slavism" of the Esperanto style.

Favora Regnestro! Honoro havas alkuŝiĝi, kio laŭ kaŭzo de antaŭskri-

bita al mi kun kuracisto kuraco mi en efektiva tempo ne en stato elpleni de donita kun mi al vi promeso; apud kio posta perigas, ke mi turnos sin al domo tra du monatoj, ne pli frue de fino de Aŭgusto."

This same piece written in Esperanto style would sound as follows:

"Estimata sinjoro. Mi havas la honoron raporti al vi, ke kaŭze de kuracado, rekomendita al mi de la kuracisto, mi en la nuna tempo ne povas plenumi la promeson, kiun mi donis al vi; mi ankaŭ sciigas vin, ke mi revenos hejmen post du monatoj, ne pli frue ol en la fino de Aŭgusto."

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Por ŝpari la poŝtelspezoj ni kvitancas la ricevon de donacoj kaj abonoj jene:—(la daton post la nomo kaj sumo montras al kiu dato la abono estas pagata) G. Bird, 4/6, aŭg. '28; L Lawson, 4/6, aŭg. '28; H. N. Love, 4/6, julio '28; A. M. Carter, 4/6, junio '28; P. Leahy, 9/- junio '28; H. S. Rienitz, 4/6, majo '28; F. Trewin, 4/6, sept. '28; J. T. Downey, 5/6. donaco, 4/6, junio '29; R. B. Bigelow, 4/6, junio '28; C. L. Clarke, 4/6, junio '28; D. W. Kvarnstrom, 5/-, sept. '28; W. L. Waterman, 9/-, junio '29; F. T. R. McArdie, 4/6 aŭg. '28; N. R. Thomas, 4/6, junio '28; H. V. Tilbury, 4/6, junio '28; E. D. Nisbet, 9/-, okto. '29; F. Livy, dec. '27; A. H. Slade, 10/-, julio '29.

GAZETOJ RICEVITAJ.

British Esperantist, 269; Belga Esperantisto, 6-7; Bulteno de la Esperanta Komitato, 8; Bulteno de Esperanta Preso-Agentejo, 3; Der Arbeiter-Esperantist, 8; Esperanto-Anzeiger, 7; Heroldo de Esperanto, 29 ĝis 33; Internacia Esperanto-Servo, 19-20; International Language, Aug.; Kristana Revuo, 1; La Unigita Tuthomaro, jul. aŭg.; La Suno Hispana, 12v; La Fervojisto, 5-6; La Lernanto, 50; Libera Laboristo, 7; La Revuo Orienta, 7; La Progreso, 6; Munkaskultura, 5-6; Oomoto 27; Oomoto Internacia, 19; Svenska-Tidningen; La Espero, 6-7; Verda Mondo, 7, 8.

ESPERANTO AND TOURISTS.

Esperanto is increasingly employed in connection with touring. The Touring Offices of Colagne, Budapest and Neuchatel have published illustrated guides in Esperanto.

—I.E.S.

NIGRULOJ KAJ SUPERAKVOJ.

De E. S. Sorenson en "Sydney Morning Herald" de 21a marto, 1927.

—

Rimarkinda okazo dum lastatempa superakvego en Kvinslando estis la droniĝo de kelkaj indiĝenoj. Tia morto ĉe la gentoj de Murri neniam okazis en la malnova tempo, en kiu la gentoj estis multehomaj kaj la superakvegoj estis pli oftaj, ol ili estas en la nuna tempo. Almenaŭ dum mia multjara spertado inter la indiĝenoj mi neniam aŭdis diri, ke unu el ili tiamaniere perdis la vivon. Kvankam ili grandnombre loĝadis apud la bordoj de la riveroj, kaj kvankam iam kaj iam superakvegoj subite alkuregis kaj rapide superverŝis la teron, ili ĉiam ĝustatempe forsavis sin sur eksterdanĝeran lokon. Se la akvo ĉirkaŭis ilin, tio ne tre timiĝis ilin, ĉar ĉiuj de pli ol sesjaraj povis naĝi.

Laŭ la pratempa moro de la indiĝenoj en la sovaĝejo la virinoj havas la devon instrui la infanojn naĝi, kaj tion ili faras en profunda akvo preskaŭ tuj kiam la etuloj ekpovas kuri. Ĉar la hejmo aŭ vilaĝo de indiĝeno ĉiam estas apud rivero, tiu kiu ne povus naĝi estus en konstanta danĝero droni. Plue en ilia vagado en la sovaĝejo la familioj ofte devas transiri profundajn riverojn kaj riveretojn kaj surdorse transporti tiujn infanojn, kiuj ne povas naĝi, krom se ĉe la transirejo troviĝas arboŝelaj boatoj faritaj por la transiro. Kompreneble, ke la plenaĝuloj kiel eble plej baldaŭ senŝargigas sin de tia laboro.

La indiĝenoj estas atentegaj observantoj kaj komprenemaj studantoj de la ilin ĉirkaŭantaj sovaĝaj kreitaĵoj, kaj en la tempo, kiam ili estis grandnombraj en la orientaj regionoj kaj laŭlonge de la rivero Murray kaj la riveroj fluantaj en ĝin, ili rimarkis iajn signojn per kiuj ili antaŭdiris pluvon kaj la okazon de superakvoj. Vidinte ranojn forlasantaj la riverbordojn kaj superflueblajn akvokavojn ili tuj transloĝiĝis sur pli altan lokon ekster la atingeblo de superakvo kaj kie hejtoligno estis proksima kaj abunda. Diversaj specoj de ranoj loĝas apud riveroj kaj en marĉoj, sed neniu speco amas fluantan akvon, kaj tial, ke sur pli alta tero ilia vivo ofte dependas de pluvo, la indiĝenoj akceptis ĝeneralan formigradon tien kiel nepran sig-

non de venonta superakvo.

La sagacon de la formikoj antaŭdiri pluvon kaj superakvon la indiĝenoj ne dubis, kaj kiam tiuj insektoj, plenokupe laboris pri translokiĝo sur pli altan lokon ekster la atingeblo tikigis siajn citadelojn kontraŭ troa malsekeco, tio estis signo de venonta superakvo, kaj kiam surgrunde loĝantaj araneoj kovris siaj kavetojn, tio por la indiĝenoj estis nepra antaŭdiro pri venonta pluvego. Alia signo estis amasa formigrado de riveraj testudoj al malproksimaj lagunoj, sed kiam tiuj amfibiuloj forlasis la lagunojn por iri la riverojn, tio estis signo de tempo de senpluveco. Multajn birdojn la nigruloj konsideris kiel antaŭvidantojn de venonta vetero kaj inter ili ĝenerale la nigran kakatuon, sur kies agojn kaj kriojn influas certaj statoj de la atmosfero. Dum la pluviga ceremonio la pluvfaristoj de iuj gentoj ornamis sin per plumoj de la nigra kakatuo aŭ portis en la manoj faskojn el tiaj.

Pluvadon kaj superakvon antaŭdiris la stranga, ŝiranta krio de la kukolsimila birdo "Channel-bill (t.e. kanelita beko. Seythrops novaehollandiæ) ĝenerale nomata "floodbird (t.e. superakva birdo) de la loĝantoj en la Kvinslanda sovaĝejo. Tiu birdo sin movas laŭ la fluejoj, je kelka distanco antaŭ la superakvo, el la nordaj partoj de Kvinslando ĝis la rivero Barcoo kaj ties regiono.

Alia antaŭdiristo de pluva vetero estis la blanka ibiso (?Threskiomis strictipennis), kiu iras renkonte al pluvoj, kvankam aliaj akvaj kaj marĉaj birdoj sekvas tuj post granda pluvado.

Estis nenio en la sovaĝejo, kion ne rimarkis la vigla okulo kaj atentega orelo de la indiĝeno de Murri. Eĉ ŝanĝo en la krinoto de birdo estis plena de signifo por li. Dum la pasado de nekalkuleblaj jarmiloj li lernis la naturajn leĝojn de la sovaĝejo, kaj tra ĉiuj siaj generacioj li loĝis inter la vivantaj kreitaĵoj de sia regiono. La sovaĝejo estis liaj lernejo kaj provizanto, kaj tial ĝi povis doni nenian signon, kiun li ne povis interpreti. Li sciis la historiojn kaj kapricojn de la riveroj en sia landparto kaj ĉion, kion oni devas atendi pro ili. Kvankam por li muĝanta superakvo estis travibriga spektaklo, ĝi ne estis bonvena okazo. Li neniel timis ĝin, kie ajn ĝi lin trafis, ĉar en okazoj de subita danĝero pro neantaŭvidita multe pli ol ordinara superakvo, savis lin liaj lerteco kaj eltenemo en la akvo kaj lia povo rapide grimpi arbojn aŭ similmaniere sin svingi de branĉo sur branĉon. Plaĉis al li, ke de tempo al tempo okazis iom alta, rapidkura fluo, ĉar ĝi purigis kaj freŝigis la riverojn, sed se la akvo atingis aŭ superiĝis la bordojn tio ofte ruinigis la fiŝkaptadon. En iuj landpartoj la okazo de superakvoj venigadis plagantajn svarmojn da "sabiomuŝoj," kiuj tiel turmentis la kanguruojn, ke ili foriris. Al la indiĝeno plaĉis la pleniĝo de marĉoj kaj lagunoj, ĉar tio returne venigadis miriadojn da anasoj kaj anseroj, kaj tiam ovoj fariĝis abundaj. Ankaŭ la okazo de superverŝita laguno donis al li grandan fiŝarojn, kiuj tiam forliberiĝis kaj naĝis super la akvokovritaj herbaj terplatoj al la riveroj kaj riveretoj, kie eble ili sufokiĝis de koto.

Tial kiam la antaŭvidistoj avertis pri venonta ruiniga superakvego de rivero, la indiĝenoj transmovis sian vilaĝon en la proksimon de alia superakvo ne tro granda por provizi al ili nutraĵon.

El la Angla lingvo tradukis George Gordon, F.B.E.A.

KRONIKO.

MELBURNO, V. — En la frua parto de septembro, kelkaj Esperantistoj kaj geamikoj renkontiĝis en la ĉefurbo kaj veturis vagonare ĝis Hurstbridge. Survoje, fruktarboj kun blankaj kaj ruĝkoloraj floroj, vidiĝis inter la kampa verdaĵo, kaj subite, la ekvido de belaj, kvazaŭ orkovritaj arboj, elvokis ekkrion de admiro. Estis la akacio kiu ravis la rigardantojn, kaj, poste, piedirante laŭ longe de la rivereto, ili kolektis bonajn specimenojn. Intertempe, la anoj bone profitis je la okazo kaj ekzercis sin en la parolo de la kara lingvo.

La kutima danco, allogis la dancamantojn, kiuj pasigis feliĉan vesperon per tiu ekzercado. — Por provi la lertecon de la anoj, estis arangita je sept. 9, Esperanto konkurso, hiu estis amuza kaj ankaŭ instrua. Tre ridinda dabato "Ĉu estus bone faru imposton iur katoj," okazis je la 30a, kaj la prono estis vigle debatita. — Tiun saman vesperon la anoj havis la plezuron bonvenigi inter si, s-ron L. Hiob, kiu

jus alvenis el Estonia. La sinjoro afable respondis al la bonvenigaj vortoj, kaj pasigis la vesperon per interesa interparolo kun la anoj.

AUCKLAND, Nova Zelando.—Sinjorino J. L. King, el Gisborne, daŭras sian laŭdindan kaj efikan propagandadon. Dum vespero, 24an aŭgusto, nia samideanino paroladis per radio de stacio, 1YA. Post la parolado, s-ino King brodkastis kanton en Esperanto al la radiaj aŭdantoj.

WELLINGTON, N.Z. — Klubo, nominata "Esperanto-Klubo de Wellington," fondiĝis dum 31a aŭgusto, kiam ĉirkaŭ dekduo da interesatoj entuziasme kunvenis. Pardonpetoj pro forestro neevitebla estis ricevitaj de kvar aliaj personoj.

S-ro Daniel, kiu prezidis, klarigis la celojn, disvastigon, k. t. p. de Esperanto. S-ro Potts priskribis la progreson kaj agon de la antaŭa societo, kiu kreskis ĝis ĉirkaŭ 150 da anoj, sed dum la milito ĉesis funkcii.

Jen la oficistoj de la nova klubo:— Prezidanto, s-ro W. L. Edmanson, F.B.E.A.; vic-prezidanto, s-ro L. E. Dust, D.B.E.A. kaj Delegito de U.E.A.; sekretario, s-ro Bertram Potts, F.B.E.A. (Adreso: 34 Argentine Avenuo, Miramar, Wellington); kasisto, s-ro V. L. M. Daniel.

Intertempe la klubo kunvenas dufoje ĉiumonate — dum la unua kaj tria ĵaŭdoj el la monato — en la kunvenejo, 19 Tory strato (apud Courtnay Place).

Dum 8a septembro okazis la unua kunveno de la klubo, kiun dekkvin da anoj ĉeestis. Inter klubanoj troviĝas kvar diplomitoj de la Brita Esperantista Asocio, kiuj sin okupas pri la instruado de la lingvo al la lernantoj.

Nov-Zelandaj legantoj de S.K. estas petataj ĉiufoje rekomendi al geamikoj en la ĉefurbo aliĝon al la klubo, la adreso de kies sekretario estas supre-citita.

SYDNEY, N.S.W. — La Sydney Societo ankoraŭ progresas kaj reorganizis la klasojn. Multaj novaj anoj aliĝis.

Unu vesperon okazis ĝuindaj konkursoj arangitaj de s-ro V. Rutland, kaj en alia vespero tiu sama samideano faris tre interesan paroladon pri la "Evuluado de Sporto," en kiu li traktis la temon de la plej fruaj tempoj, kaj montris, ke kelkaj el niaj nuntempaj sportoj estas tre antikvaj.

S-ro D. Calnan paroladis pri Giordano Bruno, kiun oni mortigis ĉar li asertis, ke la tero vojaĝas ĉirkaŭ la suno.

La ĉiumonata dancado okazis, kaj estas multe ĝuita.

La 29 de septembro alvenis s-ro W. H. Sturge, per la vaporŝipo "Niagaro". Tiu ĉi sinjoro estas vicdelegito de la U.E.A. en Birmingham, Anglujo, kaj faras mondvojaĝadon. Li portis al ni salutojn el Birmingham'aj Esperantistoj, kaj prenas hejmen la bondezirojn de la Sydney Esperanto Societo.

BRISBANO (Kvinslando. — En la lasta kunveno de la Esperanto-societo okazis parolado pri la UEA kaj ties praktika utilo, kaj la devo subteni ĝin en ĉiuj mondpartoj. Kelkaj alestantoj aliĝis al UEA, kaj oni elektis delegiton kaj vicdelegiton; sinjoroj Klement Kidd kaj Oskar Behncken.

Dimanĉon 25 septembro kelkaj societanoj havis agrablan ekskurson al Petrie, kaj amuzis sin per babilado, banado en la rivero, ktp.

Ankoraŭ venas petoj pri informoj, kaŭze de la radioparoloj el la ŝtata radiostacio 4QG; kredeble la reklamo grave helpos nian propagandon.

THE TECHNICAL PRESS AND ESPERANTO.

Following the example of other technical and scientific journals, the Revue Stenographique Belge (Duployé) will, commencing with its February number, publish summaries in Esperanto.

—I.E.S.

HAROLD PUDNEY **Specialisto pri Fontanplumoj**

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per posto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

EDUCATE THE PRESS.

—

Perhaps the most conservative of all English speaking institutions is the Press. Most of the great newspapers and journals jealously guard their columns agaist anything which hints at propaganda of a line of thought of which the editors and owners are unacquainted. This applies equally to religious matters, literature, politics and industry.

Only after years of gradual association with an idea do they venture to publish matter which the press of many other nations look upon as ordinary matter of public interest.

In this way many great inventions have been lost to Britain. The keen active brains of the Latin races are quick to see and appreciate the value of discoveries in every field of research and invention.

It is admitted that the slow plodding instinct of the British makes for solid progress, even if slow. Nevertheless the rapid development of education among European and Asiatic peoples has resulted in a keener perception in their minds of the real material and economic value of new theories and inventions.

This aspect of the modern trend of thought is not fully appreciated by the collective British mind.

In no field of activity is this more evident than in the press of other countries. Let a new idea in connection with industry, science, politics or other field which affects the common weal, be produced, and immediately the weight of many influential newspapers is used to encourage its exploitation. This applies among other things to Esperanto.

The average British pressman regards the international auxiliary language as something to be regarded with suspicion, as a fad, or as propaganda from a tainted source. Contrary to this, the press of most other countries look upon Esperanto as an inspiration. To them it promises a means for increased commercial prosperity, greater facilities for trade, a method of quick, easy communication.

Quick thinking minds realise the hundred and one ways that Esperanto opens up for national progress and the various national journals open their columns to Esperanto. Every important European city is using the international language in connection with great exhibitions promoted by Chambers of Commerce and Manufactures. By this means much trade is being diverted from British manufacturers.

A logical course suggests itself. The national press must be educated. The work of influencing and teaching can be done by those who already have taken the trouble to learn. A steady, constant flow of short articles, paragraphs, notes, cuttings, etc., from Continental and Asiatic journals, translations, reviews of books originally written or translated in Esperanto should be sent to the various editors. By these means it is possible to create a demand. Here is a field in which all who realise the benefits of Esperanto may do individual work. Verb sap.

RECENZO.

—

HISTORIO DE SAIDJAH KAJ ALIAJ VERKETOJ. Esperanta oficejo, Liem Tjong Hie, Semarang, Java.

Tiu ĉi libro estas verkita de la fama aŭtoro holanda MULTATULI kaj tradukita esperanten de konata orienta esperantisto. Ĝi estas unika en ĝia speco: holanda verko de okcidenta aŭtoro, kiu bone scias la javan estintecon, esperantigita de sudamarbino, kaj prezentita al la ĉiunacia gesamideanaro.

Ni menciu la enhavon: Antauparolo 1 Historio de Saidjah kaj Adinda; 2 Alparolo al la estrop de Lebak; 3, La balĝiro (superakviĝo); 4 La japana ŝtonhakisto; 5 Thugater; 6 La Branĉkolektantino; 7 Kredkonfeso.

La historio de Saidjah prezentas la rakonton de du geamantoj junaj indiĝenaj, kiuj ambau devas perei pro bedaurindaj misŝtatoj. La rakonto estas vekrio pro la iama malbona superrego. El la du sekvantaj rakontoj ankau eliras plendo por la java indiĝeno. La 4 aliaj estas saĝaj senenhavaj verkoj el la vivo. La stilo de la aŭtoro estas rimarkinda kaj la tuto prezentas anime vere inspirantan verkon. La prezo estas malalta: po peco nur 1¼ Svisaj frankoj au kvar respondkuponoj.

ANONCO.

Seriozajn korespondantojn en Aŭstralio deziras sinjoro Jozefo Grau, Caldetas (Barcelona), Hispanujo.

IDOLA FORI.

—

Translated from the Esperanto of Prof. T. Cart.

Idola fori, idols of the forum, was the name given by Bacon to those errors which we owe to the influence of certain oratorical tricks of speech, certain commonly accepted aphorisms.

Without doubt many of our opinions as to **artificial language** belong to the same category.

Let us then examine some of the most common of our "truisms."

— —

How readily, when discussing pronunciation, we reiterate: "One letter, one sound"? But no one possessing a delicate ear could doubt that that is not true concerning the vowels; as to the consonants also, such an overstrong assertion is wrong; if we wish to pronounce Z easily and correctly, K necessarily sounds like G in the word ekzemplo"—and B sounds like P in "absurd."

Are we then to blame Dr. Zamenhof for this? Is the matter of any importance? No, certainly not!

Our rules, because they are intended to be practical, are, and must ever be, only approximate. More than sixty characters would be needed to indicate the different sounds of Esperanto, which language, however, for reasons of euphony does not possess too many. Sixty characters! Any attempt at practical usage or propaganda under such conditions would be impossible.

To change the form of a word would not meet the case; such a remedy would make reading extremely more difficult.

Well then, should the above rule be abandoned?

No: but let it not become an idol!

—

Some say: "One word, one meaning." They cry out because "romano" means both "a man who lives in Rome, or who has become possessed of Roman citizenship," and "a work of belles lettres."

But is that, too, important? No, certainly not!

If we were to do away with those double-meaning names of things and qualities we should need such a huge number of words that no one could learn them. The sentence itself defines for us the precise meaning of each word, and that suffices.

It is advisable then to retain the rule, but we must not make it an idol.

—

Others are of the opinion that the roots should never finish in a seeming suffix. They cannot sleep because the "Fundamento" contains such words as "betulo," "kulero," "muslino." They want us to cripple every future newcomer, even if it is necessary to retain the old.

But, in advising such a course, they reject the entirely commendable and practical course indicated by our Master. Soon the principle of internationality would break down under a pitiless and complicating logicality.

The same may be said in response to those who declare that we must have one root, and only one, to express the one idea. They chide Zamenhof because his "Universala Vortaro" gives us side by side "redaktoro" and "redakcio," "barbo" and "barbiro," "kancelario" and "kanceliero" and so on.

Logically these people appear right but practically, by such a hard and fast rule they would hinder the introduction of many international words that we really want and which general use inevitably, and in spite of unnatural barriers, will admit into the language, because such words are already accepted into the languages of all civilised nations, and are clearer, more understandable, and more convenient than the more logical but not international forms; such are the roots "federacio," found by the side of "federi" and "federo," "halucinacio" with "halucini" and "halucino," "evolucio" near "evolui" and "evoluado," "elektrizi" near "elektrigi" (1) and "elektro," and so on.

When we use them, let us not regret it as though we had sinned against some "single-root" dogma. In such cases no rule can be absolute; it must be always relative.

Let us not make it an idol!

Dr. Zamenhof, by his liberal application of the "Fundamento," has pointed out to us the reasonable measure, the practical method.

Let that work remain our model, for it is the sure bond of our unity!

—

(1) Although the significations of "elektrizi" and "elektrigi" are not the same, the difference between them is not, in common speech, important.

THE WORD "NE."

The word "ne" negatives that word which immediately follows it in the same sentence. This seems very plain; but in practice it is not easy for learners to appreciate the difference in meaning corresponding to the different positions of "ne" in the sentence; and it is a good exercise to alter its position and then translate the sentence. We may take an example from that casket full of gems of word-meaning—Millidge's Dictionary.

(1) Vi ne devas diri tion—You have no need (ought not) to say that.

(2) Vi devas ne diri tion—You must not say that.

(3) Ne vi devas diri tion—It is not you that must say that.

(4) Ne tion vi devas diri—It is not that that you must say.

There is a tendency to place the "ne" before the first of two verbs when it should be before the second: thus:—"Mi ne devas forgesi tion," instead of 'mi devas ne forgesi tion."

We must also remember that "ne" when used as a prefix affects only the root, but, if unattached, negatives the whole word, thus:—neaperigi—to cause not to appear, but "ne aperigi" —not to cause to appear.

MANY TONGUES.

PCJJ Adds Esperanto.

In conducting its world-wide broadcasting experiments, PCJJ, at Eindhoven, uses many languages and listeners have been surprised at the facility with which announcers change from one tongue to another. English, French and German are used with equal fluency to the native Dutch and Flemish.

The Sydney Esperanto Society has received word that Professor P. A. Schendeler, official representative of the Esperanto movement in Eindhoven, will now broadcast in the international language.

Preliminary announcements concerning these transmissions will be made from the station and Australian listeners are asked to forward any helpful information to the Sydney Esperanto Society, Rawson Chambers, Rawson Place, Sydney, or 'phone the president, Mr. F. T. Simon, FX5549.

PCJJ broadcasts on a wave length of 30.2 metres on Tuesdays and Thursdays from 7 to 9 p.m. -G.M.T.

—"The Sun," 1/10/27.

BRISBANE ESPERANTO CLUB kunvenas la trian Mardon ĉiumonate, 7.45 p.t.m., ĉe State Service Union Room, trian etaĝon, King House, Queen Str. Vic-Prezidanto, C. Kidd. Sekretariino, Miss E. B. Carrick, Office of Supt. Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro N. Grant; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaudon de 7.45—10 ptm. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str:, ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A Beckett, 177 Davey-str:, Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

—— Send for ——

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, 323-325 Bourke Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.